N-ro 2/2019
31a jaro (2a periodo)

inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Vidar B. Skratting – Muntis: jpa



En tiu ĉi numero de IND vi povas legi la raporton de la landa kunveno de NJE, kiu aranĝiĝis la 1an de junio. La landa kongreso markis la finon de la periodo de la pasinta estraro kaj la elekton de nova. Mi volas uzi tiun eblecon por danki la estraranojn dum la periodo 2017-2019 pro iliaj kontribuoj kaj pro la bona kunlaboro. Samtempe, mi antaŭĝojas labori kun niaj novaj kaj tre kapablaj estraranoj, kaj mi certas ke la venonta periodo estos plena de sukceso por nia organizo.

*Vidar,*
*Prezidanto de NJE*

# Protokolo de landa kunveno de Norvega junularo esperantista, 1a de junio, 2019

### Malfermo

La kunveno estis malfermita je la 15a10.

### Aprobo de alvoko

La sekretario dissendis alvokon per poŝto, Vizaĝlibro kaj Skajpo 11 tagoj antaŭ la kunveno. Li provis ankaŭ sendi per NJE-listo, sed tio ne funkciis.

La alvoko estis aprobita.

### Elekto de kunvenaj postenoj

Proponoj:

- Kunvena prezidanto: Vidar Benjamin Skretting
- Raportanto: Leif Arne Storset
- Subskribontoj:
  - Matias Särkelä Jentoft
  - Vidar Benjamin Skretting

Ĉiu estis elektita.

### Raporto pri agado kaj ekonomio

Vidar prezentis la jarraportojn, la kalkulojn kaj la resumon de 2019.

### Proponoj

Neniu propono pri statutŝanĝoj vvenis al la estraro antaŭ la limdato.

### Elektoj

#### Estraro

La estraro trovis nur tri kandidatojn al la estraraj postenoj. La landa kunveno decidis elekti tri homojn por la kvar postenoj, kaj komisiis al la estraro serĉi la kvaran.

Jen la proponoj:

- Prezidanto: Vidar Benjamin Skretting
- Kasisto: Jacob Fjeld Grevstad
- Vicprezidanto: Henrik Håndlykken
- Sekretario: Henrik Håndlykken

Ĉiu estis elektita.

#### Revizio

La kunveno elektis la jenajn:

- Revizoro: Amelie Matt
- Vicrevizoro: Matias Särkelä Jentoft

#### Elekta komisiono

La kunveno elektis la jenajn membrojn por la elekta komisiono:

- Vidar Benjamin Skretting
- Henrik Håndlykken

### Planoj por la venonta periodo

Venis kelkaj proponoj:

- Henrik povas aranĝi ludan vesperon.
- Gravas bonveni neaktivajn membrojn.
- Peti retpoŝtadresojn de membroj.
- Du aranĝoj dum la jaro.
- Daŭrigi Mojosan vesperon.

### Diversaĵoj

La landa kunveno de NEL diskutas la estontecon de Esperantonia, kaj Amelie petis komentojn de NJE. La landa kunveno diskutis la aferon, kaj Amelie reprezentos la diskuton al NEL.

### Fermo

La kunveno finiĝis je la 16a10.




© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com

— Fino de Inter ni dirite —